

# TOPONIMIO DE ESPERANTO EN HUNGARIO

de Árpád RÁTKAI, 2010-02-13

## 1. Pri kiuj/kio oni nomis geografiajn lokojn?

BABITS Mihály	JAKAB Lajos	SCHWALB Miklós
BAGHY Gula	KALOCSAY Kálmán	SIMONYI Zsigmond
BÁLINT Gábor	KARINTHY Frigyes	SZEMŐK Balázs
BÁRCZI Géza	KILIÁN György	VÁNDOR Sándor
COMENIUS, Jan Amos	KIZUR István	STROMFELD Aurél
ČIRPANOV, Radivoj	KORACH Mór	VEIGELSBERG Hugó (alinome Ignótos)
Esperanto, Lingvo Internacia	KOSZTOLÁNYI Dezső	VIKÁR Béla
GYŐRI NAGY Lajos	KULICH Gyula	ZAMENHOF Lazar Markovič
HÁMÁN Kató	LANGLET, Valdemar	
Ignótos (vidu: Veigelsberg)	LUKÁCS István	

En la jaroj 1941-1944 parto la jugoslavia regiono Vojvodio estis sub hungara okupado kun la nomo Délvidék. Post la milito tie oni nomis stratojn pri E-istoj, kiuj falis aŭ estis murditaj dum tiu tempo. Kiam la urbo Subotica/Szabadka estis aneksita en Hungarion, oni torturis kaj pendumis 15 partoprenantojn de la rezist-movado, kaj inter ili estis du E-istoj (Lukács, Schwalb). Aliaj du (Čirpanov, Kizur) falis en paŝ-batalo.

Hungara-Esperanta vortareto de geografiaj nomoj: **forrás** *fonto*, **hegy** *monto*, **híd** *ponto*, **kilátó** *elvidejo*, **köz** *pasejo*, **park** *parko*, **pihenő** *riposejo*, **sétány** *promenejo*, **utca** *strato*, **tér** *placo*, **út** *vojo*.

**BABITS Mihály** (1883-1941) poeto, tradukisto, radaktoro. Komitatano de Unio di Lingvo Internacia (1914-1919), poste eksidistiĝinta verkinto de la enkonduka studo de esperantlingva *Hungara Antologio* (1933). – **42 Babits Mihály utca, 1 Babits Mihály sétány**

**Babits Mihály sétány:** Budapest I. (Vár)

**Babits Mihály utca:** Ajka, Alsóörs, Balatonalmádi, Balatonboglár, Békéscsaba (Gerla), Berettyóújfalú, Bonyhád, Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc), Debrecen, Dombóvár, Dunakeszi, Dunaújváros, Enying, Esztergom, Göd, Gödöllő, Gyomaendrőd, Győr (Nádorváros), Gyula, Hatvan, Kazincbarcika, Kecskemét, Kerepes, Komárom, Martfű Mátészalka, Miskolc, Mosonmagyaróvár, Nyergesújfalú, Orosháza, Paks, Pincehely, Siófok, Szeged (Újszeged), Szekszárd, Szombathely, Tapolca, Tatabánya, Tiszaújváros, Törökszentmiklós, Zalaegerszeg.

**BAGHY Gyula** (1891-1967) Esperanta poeto, verkisto, pedagogo, movadorganizanto karesse nomata Paĉjo, esprimis sentojn, kiuj dekomence estis karaj al la esperantistoj. Li evitis ligi sin al konataj politikaj-ideologiaj pozicioj kaj tiamaniere helpis al la meza nepolitikema esperantisto identigi sin kun lia

idealo de homa frateco. Kunprezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1924-1928), prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro (1955-1960) kaj tiu de Hungara Esperanto-Asocio (1960-1965), membro de Akademio de Esperanto (1928-1967), honora membro de Universala Esperanto-Asocio (1937-1967).

**Levelek. Baghy Gyula utca.**

**Miskolc. Baghy Gyula utca. 1977.** (erare 1989, en Röllinger p. 54.)

**Nagybakónak. Baghy Gyula Eszperantó-forrás.** Norda latitudo 46° 33,5420', orienta longitudo 17° 01,7980' Alto: 222 m. Unu km sude de la vilaĝo Nagybakónak. En ripozloko de bela arbara valo, ĉe la turisma vojo kun blua signo. **1980.** Klarigtabulo: **JULIO BAGHY ESPERANTO-FONTO. BAGHY GYULA ESZPERANTÓ-FORRÁS. 1980.** Tie ĉi tre proksime estas ankaŭ du aliaj fontoj: Árpád Cserkész-fonto kaj Kalocsay Kálmán Eszperantó-fonto. Tiu ĉi Baghy estas la dekstra. En la 1930-aj jaroj tie ĉi tendumantaj skoltaj donis nomojn al tiuj fontoj, sed el tiuj nur la nomo Árpád restis, la fontoj iĝis neuzeblaj, eĉ oni forgesis ilin. En la sepdekaj jaroj oni remalkovris ilin kaj oni ĉirkaŭmasonis du, kiujn en 1980 oni nomis pri du esperantistoj. Poste maljunaj skoltaj konstruis la plian, „senakvan memorfonton” Árpád. La medio estas bela kaj somere malvarmeta, la fontakvo estas bonkvalita. Sidlokoj kaj fajrejo estas. – <http://hotelbaranya.hu/poi.geo?id=5073> (kun tri fotoj) – [www.nagykanizsa.info](http://www.nagykanizsa.info) – Röllinger p. 56, foto p. 58.

**BÁLINT Gábor, szentkatolnai** (1844-1913) lingvisto, orientalista, universitata profesoro en la urbo Kolozsvár (ekde 1918 Cluj, Rumanio), la unua hungara esperantisto (1897) kaj la unua hungara idisto (1907), fine kabeiganto (1909).

**Söjtör. Bálint Gábor Eszperantó-forrás.** Apud Deák-forrás (alinome Deák-kút). **2002.**

**Balatonfüred (Balatonudvari). Dr. Bálint Gábor utca. 1974.** Sur la vojo 73 post la templo 500 m, poste maldekstren al la direkto de la lago ĝis la strato Vitorla.

**BÁRCZI Géza** (1894-1975) lingvisto, universitata profesoro, membro de Hungara Scienca Akademio. Esperantisto ekde 1908, redaktoro, poeto, tradukisto. Tradukis el La tragedio de l' homo de Imre Madách. Komitatano (1965-1969) kaj honora prezidanto (1969-1975) de Hungara Esperanto-Asocio, iniciatinto kaj patroanto de la Esperanto-fako en la universitato ELTE.

**Budapest III. (Békásmegyer). Bárczi Géza utca.**

**Debrecen. Bárczi Géza utca**

**COMENIUS, Johannes Amos / KOMENSKÝ, Jan Amos** (1592-1670) Humanisma pedagogo, laŭ etna deveno ĉeĥa-morava-hungara, kiu instruis i. a. en la hungaria urbo Sárospatak (1650-1654). En sia verko *Via lucis* li ellaboris la socian teorion pri Internacia Lingvo (limigante ĝin de la teorio pri Universala Lingvo) kaj la lingvajn principojn de la lingvo. La projekton de tiu lingvo publikigis Zamenhof en 1877.

**Sárospatak. Comenius utca.** Sur la domo nr. 6. griza ŝtona **memortabulo** Inaŭguro: **1990-09-28.** Skulptisto: Béla Mladonyiczky. **COMENIUS.** Starigis ĝin la departementa direktorejo de la banko OTP, Societo por la urboprotekto kaj –beligo, Hungara Societo Comenius. Inaŭguris la akademiano Béla Köpeczi, honora prezidanto de Hungara Societo Comenius. ◀ <http://www.sarospatatak.hu/nevezetessegek/>

**ĆIRPANOV, Radivoj / ЋИРПАHOB, PадИBOj** (1909-1941) ŝuisto en la urbo Novi Sad. Esperantisto, membro de la lokaj Laborista Esperanto-Societo kaj naturamika organizaĵo. Dum la milito li organizis la rezist-movadon, estis gvidanto de Militkomitato por Vojevodio kaj la 5-an de oktobro falis en surstrata pafbatalo kontraŭ la hungaraj okupantoj. En 1943 oni proklamis lin Popola Heroo.

**Novi Sad / Újvidék RS ulica Ĉirpanova.**

**Senta / Zenta RS Radivoj Ĉirpanov utca. 1982.**

**Sombor / Zombor RS ulica Radivoja Ĉirpanova.**

**Esperanto, Lingvo Internacia**, iniciatita de Lazar Markoviĉ ZAMENHOF en 1887.

1. **Baja. Eszperantó utca. 1993.** En la kvartalo Katonaváros.
2. **Békéscsaba. Eszperantó utca. 1987.** En la periferio de la kvartalo Fényes, kun nur kelkaj domoj.
3. **Budapest XVII. Eszperantó utca. 1948.** En la kvartalo Rákoscsaba.
4. **Csorna. Eszperantó utca. 1967.** Ĝi ligas la vojon Soproni kun la strato Andrásy.
5. **Dunaújváros. Eszperantó út. 1966.** En la kvartalo Barátság, flankstrato de la vojo Vasmű, apud la Sporthalo. Sur la domo nr. 1. **memortabulo** el verda marmoro. Inaŭguro: 1987-05-30. Festparolis dr. József PÁL, ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio, Inaŭguris Sándorné CSIMA, sekretario de urba konsilio de Patriota Popolfronto. Teksto de la tabulo: **100 ÉVES AZ ESZPERANTÓ / 1887** [kvinpinta stelo, en ĝi litero E] **1987 / 30 ÉVES A DUNAÚJVÁROSI / HALADÁS / ESZPERANTÓ CSOPORT** [ESPERANTO 100 JARA / 1887 / 30 JARA EN DUNAÚJVÁROS / PROGRESO / ESPERANTO-GRUPO] >> Emil Máthé: Nova memortabulo en urbo Dunaújváros. = *Budapeŝta Informilo*. 1987. jul-aŭg. 25.
6. **Eger. Eszperantó sétány. 1976.** En la urbocentro. En la mezo de la strato Zamenhof-memortabulo.
7. **Érd. Eszperantó tér. 1948.** Inter la vojo Velencei kaj la fervojo.
8. **Esztergom. Eszperantó utca. 1948.** Ĝi kunligas la straton Kossuth Lajos kun la promenejo Kis Duna. – Sur la domon nr. 17. oni planis unaŭguron de dulingva memortabulo el verda granito la 20-an de majo 2006, sed la evento ne okazis, ĉar oni forgesis akiri la permeson de la instanco pri konstru-aferoj. >> *Nova Espero*. (Szolnok) 2006. jun. p. 5.
9. **Gyöngyös. Eszperantó utca. 1948.** El la strato Vachot Sándor kondukas suden, laŭ la maldekstra bordo de la rivereto Gyöngyös.
10. **Győr. Eszperantó utca. 1948.** Sude de la fervojo, tra sub la ponto Baross Gábor. Sur la domo de dogan-instanco (Vám- és Pénzügyőrség Országos Parancsnoksága Központi Ellenőrző Parancsnokság) **memortabulo** el blanka marmoro, inaŭgurita en **1987**. Ĝia teksto: **ESZPERANTÓ / AZ EGYETLEN SEMLEGES NYELV MELYET / DR. L.L.ZAMENHOF LENGYEL ORVOS ALKOTOTT / MÁSODIK ANYANYELVKÉNT A NEMZETEK KÖZÖTTI / MEGÉRTÉS ÉRDEKÉBEN. A LÉTREHOZÁS 100. / EVFORDULÓJÁN 1987-BEN ÁLLITTATTA / HNF VÁROSI BIZOTTSÁG, VÁROSSZÉPÍTŐ EGYESÜLET, /**

**GYŐR ESZPERANTISTÁI.** [ESPERANTO / LA SOLA NEŬTRALA LINGVO KIUN / LA POLA KURACISTO L. L. ZAMENHOF KREIS / DUA GEPATRA LINGVO / INTER LA NACIOJ / POR KOMPRENO. LA ESTIGO 100. / DATREVENO EN 1987 STARIGIS / PPF URBA KOMITATO, URBOBELIGA SOCIETO, ESZPERANTISTOJ DE GYŐR.] ❧ Horváth József

11. **Gyula. Eszperantó tér.** 1973. Ĉe la renkontiĝo de Vértanúk-vojo kaj la strato Szent István.
12. **Hódmezővásárhely. Eszperantó utca.** 1994. En la centro de la kvartalo Hód-tó.
13. **Kalocsa. Eszperantó utca.**
14. **Kazincbarcika. Eszperantó utca.** 1982. En la kvartalo Belváros, suda flankstrato de la strato Liget.
15. **Kecskemét. Eszperantó utca.** 1964. En la kvartalo Hunyadiváros.
16. **Kisújszállás. Eszperantó utca.** 1994.
17. **Komárom. Eszperantó utca.** 1948. Sude de la MÁV-loĝkvartalo, kunliganta la stratojn Gyár kaj Klapka György. Ĝia pli frua nomo: vojo Kötő.
18. **Komló. Eszperantó tér.** 1976-06-25. Malantaŭ la Urbodomo, inter la placo Városház kaj la fervojo. Sur la muro de Urbodomo strat-nomtabulo, kiu estas ankaŭ memortabulo kun la teksto: **ESZPERANTÓ TÉR / Nevét, az 1976-ban / Komlón rendezett / Országos Eszperantó Kongresszus / emlékére kapt.** [PLACO ESPERANTO / Sian nomon en 1976 / aranĝitan en Komló / Landa Esperanto-Kongreso / je la memoro ricevis.]– Kroniko de la 26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso KOMLÓ 1976-06-25/27. = Budapeŝta Informilo. 1976. aŭg. p. 1-4. – Sur la foto (p.5.) en la sama loko videblas alia tabulo! >> ❧ Kovács János
19. **Makó. Eszperantó utca.** 1981. En la kvartalo Bánom. Sakstrato el la strato Gőzmalom. Nomdono laŭ la iniciato de Mihály SZEKERES.
20. **Miskolc (Lillafüred). Eszperantó forrás.** 1977. En la kvartalo Lillafüred. Atingo: piede en la dekstra flanko de la valo de la rivereto Garadna, inter la lago Hámori kaj la etŝpura fervojo sur agrabla arbara „promenjo” kun la turistaj signoj ruĝa aŭ blua+ ni atingas ŝtonan kulverton, kiu sub la etŝpura fervojo kondukas la akvon de la fonto en la lagon Hámori. Tie estas ripozloko kun benko. Maldekstre supren-serpentumanta vojeto kondukas al la fonto. La trinkebla akvo de la fonto devenas el tiu grot-lago, kiu estas en la fino de la groto Létrási-Vizes. La originala nomo de la fonto estis Rovienka. Sur la malnova, pretendema ĉirkaŭmasonado nigra marmortabulo: **ESPERANTO FORRÁS 1977.** Celante fortikigon en la jaro 2000(?) *DVTK Természetjáró Szakosztálya* elkonsturis novan ĉirkaŭmasonaĵon antaŭ ĝin, sed malantaŭe lasis parton de la malnova kun la tabulo. La nova estas malpli pretendema kaj sur ĝi estas postsigno de forigita, nekonata tabulo. Antaŭ foliarigo de tie oni povas vidi la lagon. La ĉirkaŭaĵo de la fonto estas neglektita, sed interesa: la fonto mem konstruis kalkmonteton, de sur kiu la fontakvo fluas maldika akvofaleto. Fonto: [http://members.chello.hu/m.pepich/forras/eszperanto\\_forras.htm](http://members.chello.hu/m.pepich/forras/eszperanto_forras.htm)
21. **Miskolc. Eszperantó utca.** 1988. En la kvartalo Görömböly. Laŭ la norda bordo de la rivereto Hejő.
22. **Nagybakónak. Baghy Gyula Eszperantó forrás.** 1980. 1 km de la vilaĝo, en valo laŭ la blua turista vojsigno, ĉe ripozloko. Norda latitudo 46° 33,5420'. Orienta longitudo 17° 01,7980'. Alto 222 m.

23. **Nagybakónak. Kalocsay Kálmán Eszperantó forrás. 1980.** 1 km de la vilaĝo, en valo laŭ la blua turista vojsigno, ĉe ripozloko. Norda latitudo 46° 33,5420'. Orienta longitudo 17° 01,7980'. Alto 222 m.
24. **Nagykálló. Eszperantó utca.**
25. **Nagykőrös. Eszperantó utca. 1948.** Mallonga strato en la urbocentro, liganta la stratojn Kossuth Lajos kaj Jókai Mór.
26. **Nagymaros. Eszperantó-hegy. 1979-05-05.** Ekde la 70-aj jaroj ekskursejo de busdapeŝtaj esperantistoj. Ĝi ricevis sian nomon okaze de la 7. Internacia Zamenhof-Pacmarŝo, pli frue ĝi ne havis nomon. En la montaro Börzsöny, 4 km de la urbo, laŭ la ruĝa turista vojsigno. Betonbloko montras la alton kaj la jaron: 336 m, 1982. Sur la apuda monto estas ruino de ligno-ekselrigardejo. <http://www.esperanto.hu/eventoj/bildoj/z-kilato-monto-terkep.jpg> Vidu: *Budapeŝta Informilo*. 1979. jún. p.1.
27. **Nyíregyháza. Eszperantó tér.**
28. **Orosháza.Eszperantó utca. 1976.** Mallonga strato liganta la stratojn Táncsics Mihály kaj Zombai.
29. **Pécel. Eszperantó köz. 1961.** Proksime al la Ráday-kastelo.
30. **Pécs. Eszperantó utca. 1948.** En la kvartalo Szabolcs, apud la tombejo de Szabolcsfalú.
31. **Piliscsév. Eszperantó-forrás. 1928-08-12.** En la pitoreska valo Basinavölgy. Norda latitudo 47° 41,3431' Orienta longitudo 18° 50,3927'. Alto: 285 m. En la jaro 1928 Naturamikoj de Újpest aĉetis tiun grundon, sur kiu troviĝis sennoma fonto. Kune kun la Újpest-urba grupo de Hungaria Esperantista Societo Laborista – ja la membraro de tiuj du organizaĵoj grandparte koincidis – ili konstruis ŝtonan ĉirkaŭmasonaĵon kaj apud ĝi ŝindotegitan tegmenton sur kvar kolonoj, ili plenumis laboron de 2000 horoj, kaj elektis la nomon Esperanto-fonto. La inaŭguro partoprenis 300 naturamikoj de la urbo Újpest kaj 200 loĝantoj de la vilaĝo Piliscsév, inter ili la lastaj la notario mem, kiu permesis realigi la planon. – Meze de septembro la notario tamen sendis leteron al la naturamikoj, en kiu li alvokis la malkonstrui la tegmenton kaj malpermesis uzi la malpatriotan nomon Esperanto. Ĝi tamen rericevis sian nomon. Somere de 1957 naturamikoj el la kvartalo Újpest kaj kelkaj E-istoj rekonstruis kaj ĉirkaŭis la fonton kun nova nomtabulo. 1957-08-25: dum refoja inaŭguro festparolis Lajos MÁRTON, ĝenerala sekretario de HEK. Tiam ankoraŭ oni povis trinki el la fonto. En la jaro 1966, okaze de la UK de E en Budapeŝto la fonto-ĉirkaŭmasonaĵon oni rekonstruis kaj MOKÉP produktis 20 minutan nigra-balnkan celuloidan filmon pri plia inaŭguro **1966-08-07**. Ĝis la komenco de la 2000-aj jaroj la fonto sekigiĝis pro la malaltiĝo de la karstakvo-nivelo, pri kio kulpis la troa ekspluatado de la medio dum la brunkarbo-minado. Tamen ĝi restis frekventata, ŝatata ripozloko, kiun oni ekipis per benko kaj rubujo. La menciitan filmon la Esperanto-Asocio cxe Eventoj (KEA) konservis en DVD-disko kaj ekde 2006 denove okazas ekskursoj de esperantistoj al la fonto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.
32. **Sopron. Eszperantó utca. 1987-03-10.** En la kvartalo Belváros, mallonga flankstrato de la strato Híd.
33. **Szeged. Eszperantó utca. 1958.** En la kvartalo Rókus, mallonga, norda flankstrato de la trafikplena avenuo Kossuth Lajos.
34. **Szentes. Eszperantó híd.** Ligno-ponto super la rivereto Kurca, en la parko Széchenyi-liget, konstruita en aŭgusto 1981. Projektis kaj konstruis ATIVIZIG, inĝenierado de la segmento Szentes. 45x1,5 m sur 24 kverka pontstablegoj. Ĝi kunligas la kvartalom Kiséri kun la parko

Széchenyi-liget. **1982-05-29/30**, la inaŭguron partoprenis 200, okaze de Landa Pac-renkontiĝo kun deklam-konkurso de E-grupo Julio Baghy en Szentos kaj Csongrád Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio. Norda latitudo 46° 39,0300', orienta longitudo 20° 15,1100'. Alto: 85 m.

35. **Székesfehérvár. Eszperantó tér. 1972.** En la loĝkvartalo Ybl. Eszperantó tér. **Memortabulo**. 1972. Ĝia teksto: **PER LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO POR LA MONDPACO! AZ ESZPERANTÓ NEMZETKÖZI NYELVVEL A VILÁGBÉKÉÉRT! SZÉKESFEHÉRVÁR EZERÉVES FENNÁLLÁSA ÉVÉBEN AZ ESZPERANTÓ TÉR ELNEVEZÉS ALKALMÁBÓL HELYEZTÉK EL E TÁBLÁT A VASUTAS ESZPERANTISTÁK – 1972**
36. **Tata Eszperantó tér. 1980.** Sude de la vojo Bajai.
37. **Tatabánya. Eszperantó utca. 1959.** En la kvartalo Bánhida-Paradicsomkert. Orienta flankstrato de la strato Mészáros. En 1958 la loka Esperanto-grupo Zamenhof petis de la plenumkomitato de la urba konsilantaro doni la nomon Esperanto al strato. La konsilantaro en la sekva jaro donis la nomon al strato en ĵus konstruita ministra loĝkvartalo.

---

### Estintaj E-toponimoj:

Budapest VIII. (Józsefváros): Eszperantó u. 1946-1953. Auróra u.

Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc-Lónyaytelep): Eszperantó u. 1947-04-25 – 1953 (poste Esztergályos u.)

Budapest XX. (Pesterzsébet Gubacsi hídfő): de 1945, plejparte ĝis 1953, ĝia lasta parteto ĝis 1980 (poste Télaégető u.)

Budapest XXIII. (Soroksár): Eszperantó u. 1948-1953 (poste Fodrász u.)

Miskolc: Eszperantó tér 1957-06-13 – 1999 (poste Szent Anna tér) – Foto: 1967-12-17: Eistoj de Miskolc florkronis ĝin, parolis dr. Lajos Győry Nagy. ► Foto pri la kunveno: Heroldo de Esperanto. nr. 1447. 1968-12-17. - Adolf Holzhaus: Granda Galerio Zamenhofa. 2. Fondumo Esperanto, 1978. p.58., 364 (la kunveno).

Nyíregyháza: Dr. Zamenhof u. 1959-1961. (Körte u. 1890-1959 kaj de 1961)

Sátoraljaújhely: Eszperantó u. 1948 – ?

Vác: Eszperantó u. 1948 – ?

Zalaegerszeg: Eszperantó u. 1948 – ĉ. 1968. (Malgranda strato estis malantaŭ „Ispita” kaj la parokejo, sed tie oni formis elegantan placon kun magazenoj.)

**GISSWEIN Sándor** (1856-1923) papa prelato, kanoniko, lingvisto, filozofo, koresponda membro de Hungara Scienca Akademio, prezidanto de Akademio Sankta Stefano, fondinto de la hungara kristansocialista movado, deputito de la balot-distrikto Mosonmagyaróvár, prezidanto de Hungara Pac-Asocio, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1911-1923).

**Győr. Eszperantó utca.** "Laŭ la peto en la nomo de E-klubo 'Verda Stelo' en Győr kaj fakgrupo de Hungara Fervojista Esperanto-Societo kaj esperantistoj de Győr la urba aŭtonomio planas tiun nomdonon kiam oni malfermos novajn stratojn en la urbo. La peton subskribe apogis la direktoro de la gimnazio de Benediktanoj, kie iam lernis Giesswein, kaj la episkopo de Győr."



## **GYÖRI NAGY Lajos**

### **Miskolc. Györi Nagy Lajos lépcső.**

Az Avas hegyi református temető kapujáig vezető lépcsősor. Önkorm 2008. április 5. A táblákat szeptemberben szerelték fel.

**HÁMÁN Kató** (1884-1936) dum la kontraŭrevolucia reĝimo ĝismorte turmentita komunista sindikata gvidanto. E-isto ekde 1919, en la dudekaj jaroj kurso-estro kaj estrarano de la II-a grupo de Hungaria Esperantista Societo Laborista en la kvartalo Ferencváros, Budapeŝto. – La nomdonojn oni sugestis pro ŝia martireco. Malmultaj estis informitaj pri ŝia E-isteco.

**Hámán Kató körút: Zsadány**

**Hámán Kató lakótelep: Szentes**

**Hámán Kató út: Debrecen, Szentes**

**Hámán Kató utca:** Ajka, Balatonfenyves, Balatonfüred (Balatonudvari), Balmazújváros, Bánytereny, Békéscsaba (Mezőmgyer), Békésszentandrás, Besenyőtelek, Budakeszi, Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc), Celldömölk, Csongrád, Dávod, Dombóvár, Fonyód, Fót, Görcsöny, Gyenesdiás, Gyoma, Győr (Györszentiván), Győr (Szendehely), Gyula, Hajdúböszörmény, Heves, Jászárokszallas, Kazincbarcika, Kunszentmiklós, Markas, Mélykút, Mende, Mezőkovácsháza, Miskolc, Monor, Mosonmagyaróvár, Nádudvar, Nagydorog, Nyírad, Orfű, Pilisvörösvár, Poroszló, Salgótarján, Siófok, Szarvas, Szatymaz, Székkutas, Szerencs, Szombathely, Tápíószeceő, Tát, Tiszakécske, Tiszaújváros, Törökszentmiklós, Üllés, Vác, Vácegres, Zsáka.

**JAKAB Lajos** (1859-1929) ĉefkontrolisto de Déli Vasút (Suda Fervojo), ekspertizo pri stenografio, aranĝinto de la unua stenografi-ekspozicio, la unua esperantisto en la urbo Szeged, la unua hungara fervojista esperantisto, kreinto de Esperanta stenografia sistemo.

**Szeged. Jakab Lajos utca.** 270x14,5 m, inaŭgurita en la jaro **1931**. Apud la domo nr. 1., sed jam sur la flanko de anguldomo en la placo Klapka György, sub la strat-nomtabulo **nomklariga tabulo** emajla (el la fabriko Bonyhád) inaŭgurita en la jaro 2005. Surskribo: **JAKAB LAJOS (1859-1929) / A SZEGEDI GYORSÍRÓK / EGYESÜLETÉNEK ALAPÍTÓJA.** [LAJOS JAKAB (1859-1929) / DE STENOGRAFISTOJ EN SZEGED / FONDINTO DE SOCIETO]

**KALOCSAY Kálmán** (1891-1976) kuracisto. Post Zamenhof plej granda kreinto de la lingvo internacia Esperanto, poeto, tradukisto, redaktoro, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1938-1942), membro de Akademio de Esperanto (1949-1976), honora membro de Universala Esperanto-Asocio (1937-1976).

**Abaújszántó Dr. Kalocsay Kálmán utca. 1982.** –Fonto: Röllinger p. 54.

**Miskolc (Hejőcsaba). Dr. Kalocsai Kálmán utca.** inaŭgurita en la jaro **1988**. Ĝia pli frua nomo estis *Kalocsai*. Verŝajne tial erare restis en la nomo la litero *i* anstataŭ *y*. Ĝi situas ne malproksime de la finstacio de aŭtobuso nr. 14. – Erara dato de Röllinger: 1957.

**Nagybakónak**. **Kalocsay Kálmán Eszperantó-forrás**. Norda latitudo 46° 33,5310' . Orienta longitudo 17° 01,8110' . Alto 223 m. Unu km norde de la vilaĝo Nagybakónak, en bela valo, ĉe ripozloko, laŭ la turisma vojsigno blua strio. Inaŭgurita en la jaro **1980**. Klariga tabulo kun la teksto: **KALOCSAY KÁLMÁN ESZPERANTÓ FORRÁS. KOLOMANO KALOCSAY ESPERANTO FONTO. 1980**. Tie ĉi tre proksime estas ankaŭ du aliaj fontoj: Árpád Cserkész-fonto kaj Baghy Gyula Eszperantó-fonto. Tiu ĉi Kalocsay estas la maldekstra. En la 1930-aj jaroj tie ĉi tendumantaj skoltoj donis nomojn al tiuj fontoj, sed el tiuj nur la nomo Árpád restis, la fontoj iĝis neuzeblaj, eĉ oni forgesis ilin. En la sepdekaj jaroj oni remalkovris ilin kaj oni ĉirkaŭmasonis du, kiujn en 1980 oni nomis pri du esperantistoj. Poste maljunaj skoltoj konstruis la plian, „senakvan memorfonton” Árpád. La medio estas bela kaj somere malvarmeta, la fontakvo estas bonkvalita. Sidlokoj kaj fajrejo estas. – <http://hotelbaranya.hu/poi.geo?id=5073> (kun tri fotoj) – [www.nagykanizsa.info](http://www.nagykanizsa.info) – Röllinger p. 56, foto p. 58.

**KARINTHY Frigyes** (1887-1938) plej granda satiristo de la hungara literaturo, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1932-1938). Simpatianto de la Internacia Lingvo li elektiĝis prezidanto. Li naskiĝis la 25-an de junio, unu monaton kaj unu tagon antaŭ la apero de la Unua Libro.

**Karinty Frigyes út: Budapest XI. (Kelenföld)**

**Karinty Frigyes utca: Biatorbágy, Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc), Budapest XIX. (Kispest), Dunaharaszti, Dunakeszi, Győr, Kecskemét, Miskolc, Siófok, Szolnok, Szombathely, Tata, Tököl, Vajk.**

**KILIÁN György** (1907-1943), junulara gvidanto de la laborista movado, kiu malaperis en la mondmilito dum paraŝutista enbataligo en Pollando. Li estis esperantisto ekde 1922, aktivulo de Sennacia Asocio Tutmonda ĝis 1932 kaj poste de Internacio de Proleta Esperantistaro, ambaŭ malpermesitaj en Hungario.

**Kilián lakótelep: Pápa**

**Kilián városrész: Miskolc**

**Kilián György út: Szolnok**

**Kilián György tér: Budapest IV. (Újpest), Gyomaendrőd**

**Kilián György utca: Balatonfüred (Balatonudvari), Dombóvár, Ercsi, Jánoshalma, Jászberény, Jászfényszaru, Marcali, Siófok, Szabadszőlős, Szerencs, Tószeg**

**KIZUR István** (1904-1942) fervoj-laboristo, kiu loĝis en la urbo Subotica, poste en la vilaĝo Elemir, kaj estis membro de Laborista Esperanto-Societo. Post la okupado li aliĝis al la rezist-movado kaj falis en la bataloj ĉirkaŭ Kupres, Bosnio. E-istoj estis kaj liaj fratino kaj la bofrato la germano Karl Hedrih, kiu falis en Hispanio, kiel volontulo en la internacia bataliono André Edgar.

**Subotica / Szabadka SR** (ĝis 1918 kaj 1941-1944 Szabadka HU) **Kizur István utca.**

**KORACH Mór** (1888-1975) kemiisto, ceramikisto, universitata profesoro en Italio kaj en Hungario, la itala verkisto konata kiel Mauro Cora, membro de Hungara Scienca Akademio. Esperantisto ekde siaj studentaj jaroj en Budapeŝto, pioniro de scienc-teknika apliko de Esperanto, patrono de Esperanto-fako en la universitato ELTE en Budapeŝto, honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (1969-1975).



**Miskolc Korach Mór utca.** Inaŭguro en **1988**. – La nomdonon iniciatis esperantistoj.

**KOSZTOLÁNYI Dezső** (1885-1936) hungara poeto, verkisto, art-tradukisto, ĵurnalisto. Esperanton lernis ĉ. 1905, verkis pri E, liaj verkoj aperis en E, sed li rifuzis la „artajn lingvojn”. Membro de Propaganda Komitato de Internacia Lingvo (1918-1922).

**Ajka Kosztolányi Dezső utca**

**Budapest XI. Kosztolányi Dezső tér**

**Budapest XVIII. Kosztolányi Dezső utca**

**Dunakeszi Kosztolányi Dezső utca.**

**Gvál Kosztolányi Dezső utca**

**Győr Kosztolányi Dezső utca**

**Senta / Zenta SR ulica Kostolanji Dežea / Kosztolányi Dezső utca.** Ĝis **2004** ulica Vlado Tomanović.

**Siófok Kosztolányi Dezső utca**

**Szombathely Kosztolányi Dezső utca**

**Tata. Kosztolányi Dezső út**

**Tiszaujváros Kosztolányi Dezső utca**

**Zalaegerszeg. Kosztolányi Dezső utca**

**KULICH Gyula** (1914-1944) tajlor-laboristo en la urbo Békéscsaba, organizanto de la kontraŭfaŝisma Landa Junulara Komitato, martiro de la laborista movado, murdita en la koncentrejo Dachau. Dum siaj metilernantaj jaroj lernis Esperanton en la loka grupo de Hungarlanda Esperanto-Scocieto en Békéscsaba, poste membriĝis en la grupo XIX. de Hungaria Esperantista Societo Laborista.

**Kulich Gyula utca: Balatonfüzfő, Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc), Gyomaendrőd, Gyula,**

**Szolnok, Tapolca.**

**LANGLET, Valdemar** (1872-1960) sveda ĵurnalisto, kiu vizitante la unuajn esperantistojn ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo traveturis Ruslandon kaj en 1902 Hungarion. Prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio (1906-1909). Sveda lektoro de la universitato en Budapeŝto (1932-1944). En junio 1944 li aranĝis, ke la t. n. „protokolo de Auschwitz” sukcesu atingi Stockholon kaj la svedan reĝo interveni. Inter aprilo 1944 kaj januaro 1945 kun sia esperantista edzino Nina Langlet li savis la vivon de plej multaj persekutitojn en Budapeŝto, precipe aplikante la „savleteron” de Sveda Ruĝa Kruco. En 1945 li organizis manĝaĵ- kaj medikament-provizon de la ruinigita Budapeŝto.

**Budapest IV. (Újpest) Langlet Valdemár utca.** Inaŭguro en **1947**. Malnovaj, malbonstataj domblokoj en la strato. En la lernejo situanta en nr. 3-5. ĉiu tria lernanto, grandproporcie ciganoj, estas kun akumuliĝante malfavora situacio. 3-5. Sur la lernejo memortabulo inaŭgurita en **1986**, ĝia teksto: **Langlet**

Waldemar 1872-1960 a Sved Vöröskereszt főmegbizottja. 1944-ben harcolt a fasizmus ellen, segítette az üldözötteket, támogatta a rászorulókat. Emlékére állíttatta Budapest Főváros Tanácsa 1986. [Waldemar Langlet (1872-1960) ĉefkomisiito de Sveda Ruĝa Kruco batalis kontraŭ la faŝismo, helpis la persekutitojn, apogis la tiujn, kiuj bezonis halpon. Je lia memoro starigis Konsilantaro de Ĉefurbo Budapeŝto 1986]

**LUKÁCS István** (1920-1941) komercisto, E-isto ekde 1934. Li partoprenis en organizado de la rezist-movado kun alia E-isto Miklós SCHWALB, kaj pro tio ili estis inter la ekzekutitoj en la urbo Subotica la 18-a de novembro 1941. La E-ista grupo en tiu urbo perdis 11 membrojn en la milito.

**Subotica / Szabadka SR** (1941-1944 Szabadka HU) **Lukács István utca.**

**SCHWALB Miklós** (1905-1941) poeto, verkisto, ĵurnalisto, redaktoro, apartenanta al la rondo de la hungara literatura revuo HÍD en Jugoslavio. Kiel studento li esperantistiĝis en la urbo Szeged, kie lia patro, la eminenta E-isto d-ro Lajos Schwalb estis fervojista oficiro en la fervojista direkcio. La familio elmigris en Jugoslavion. Post la atako kontraŭ Jugoslavio kun alia E-isto István LUKÁCS en organizado de rezist-movado kontraŭ la hungaraj okupantoj, sed oni kaptis kaj la 18-an de novembro post torturado oni pendumis ilin kun aliaj.

**Subotica / Szabadka SR** (1941-1944 Szabadka HU) **Schwalb Miklós utca.**

**SIMONYI Zsigmond** (1853-1919) lingvisto, universitata profesoro en Budapeŝto. Vicprezidanto de Propaganda Komitato de Internacia Lingvo en 1918. En la universitato multon faris por enkonduki la instruadon de Esperanto, kio en julio 1919 rezultis fondon de la universitata Instituto de Internacia Lingvo, la unua en la mondo.

**Budapest XIX. (Kispest) Simonyi Zsigmond utca**

**STROMFELD Aurél** (1878-1927) stab-kolonelo dum la mondmilito dekorita per la plej alta milit-ordeno de Aŭstrio-Hungario, en 1919 stabestro de Ruĝa Armeo de Hungaria Konsilia Respubliko. Prezidanto de la grupo nr. XIV. (privatoficista) de Hungaria Esperantista Societo Laborista. – Lia aliĝo al la E-movado kaj je la nomdono kaj poste estis/as nekonata.

**Békéscsaba (Jamina) Stromfeld Aurél utca**

**Budapest XII. Stromfeld Aurél út**

**SZEMŐK Balázs** (1940-2005) dentkuracisto en la vilaĝo Gomba. E-isto ekde la sesdekaj jaroj. Estro de Stomatologia Sekcio de UMEA. Pluraj fak-artikoloj. Red. *Stomatologia Forumo*. Doktoriĝo pri stomatologia faklingvo en la hungara kaj E (1988).

**Gomba Szemők Balázs tér.** Inaŭguro la 23-an de oktobro **2006**. A tér a település központjában, az Egészségház, az önkormányzati Főzőkonyha és a Posta épülete által határolt Rákóczi úti teresedés nevesítésével jött létre.

**VÁNDOR (antaŭe VENETIANER) Sándor** (1901-1945) Dirigisto kaj komponisto, organizanto de laborista korus-movado, en kiu fondiĝis ankaŭ Esperanto-koruso. Li estis esperantisto ekde lia infanaĝo.

**Budapest XVIII. (Pestszentlőrinc) Vándor Sándor utca.**

**Sopron. Vándor Sándor utca.**

**VEIGELSBURG Hugó alinome IGNOTUS** (1869-1949) ĵurnalisto, kritikisto, verkisto. Ĉefredaktoro de la literatura revuo *Nyugat*. Diference de aliaj ĵurnalistoj li unue ellernis Esperanton kaj nur poste verkis pri ĝi en 1905 kaj 1911.

**Budapest XII. Ignotus utca.**

**VIKÁR Béla** (1859-1945) Etnografo, tradukisto, korespondanta membro de Hungara Scienca Akademio. Esperantisto ekde la 1910-aj jaroj, komitatano (1920-1928), poste honora membro (1928-1945) de Hungarlanda Esperantista Societo.

**Vikár Béla utca:** Balatonboglár, Barcs, Debrecen, Dunavecse, Hetes, Kaposvár, Kecskemét, Pécs, Siófok.

**ZAMENHOF, Lazar Markoviĉ** (1857-1917) kuracisto, rusa judo en Varsovio. Li estis iniciatoro kaj la plej grava kreinto de Internacia Lingvo. – Li havis dekduon da plumnomoj, el inter kiuj la plej fama estis *D-ro Esperanto*, kies dua elemento iĝis sinonimo de Internacia Lingvo. La plumnomon *Ludoviko* li aplikis en la jaroj 1904-1917. Tiun nomon oni ofte tradukis, kaj diversaj tradikaĵoj disvastiĝis sendepende de la lingvo de la taksto. Oni ofte false prezentis tiun ne plumnomon, kaj eĉ „retronomis” lin antaŭ la jaron 1904, eĉ ĝis lia naskiĝo. En bibliotekaj katalogoj kaj bibliografioj jam svarmas kombinaĵoj de eraraj kaj falsaj nomoj kaj nomformoj (ne konformaj al la lingvo de la teksto): *Lejzer, Eliezer, Lazarus, Ludwik, Ludwig, Louis, Ludovic, Ludowik, Ludovik, Ljudovit, Lajos, Markowicz, Samen Hof, Zamenhov, Zámenhof, Zámehov, Zamengov, Zamengof, Zamengoff, Zamenhoff* ktp. Pro antisemitismo kaj rusofobio oni ofte falsigas ankaŭ lian etnan apartenon. Oni ofte falsigas ankaŭ liajn gepatrajn lingvojn jidan kaj rusan, konformigante ĝin al la falsa etna aparteno kaj falsa nomo. PIV erare nomas la jidan lingvon germana dialekto, ĉar la jida estas aparta, parenca lingvo, eĉ pli malnova ol la germana (hochdeutsch).

1. **Budapest, XVII. (Rákospalota). Zamenhof utca. 1948.** (Erara datumo de H.R.: 1958.)
2. **Debrecen. Zamenhof utca. 1959.** En la urbocentro. Cent metra trairejo inter la stratoj *Piac* kaj placo *Dósa nándor*. Domnumeroj ne estas. Memortabulo 1961: **A BÉKE ÉS A NÉPEK BARÁTSÁGA / KIEMELKEDŐ HARCOSÁNAK, / DR. ZAMENHOF LAJOS / LENGYEL ORVOS (1959-1917) AZ / ESZPERANTO / NEMZETKÖZI NYELV ALKOTÓJÁNAK / EMLÉKÉRE / Emeltették a debreceni / vasutas Eszperanto / Körök / 1961 [DE LA PACO KAJ LA AMIKECO DE POPOLOJ / ELSTARA BATALANTO / D-RO LAJOS ZAMENHOF / POLA KURACISTO (1859-1917) LA / ESPERANTO / INTERNACIA LINGVO KREINTO / MEMORO / Starigis la Debrecen-ajn / fervojistajn Esperanto / Rondojn / 1961].** – Foto: Hugo Röllinger: Monumente pri Esperanto. UEA, 1997. p. 37.
3. **Kiskunfélegyháza. Zamenhof utca.**
4. **Miskolc. Zamenhof utca.** [Sur stratnomtabuloj erare: ZÁMENHOF] **1960-05-14:** inaŭguris la straton kun memortabulo Lajos KÖKÉNY, membro de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro. Sur

la memortabulo 80x120 cm: [ZAMENHOF L. LAJOS LENGYEL SZEMORVOS 1859-1917 / AZ ESPERANTO NYELV megalkotója / EZ A NEMZETKÖZI NYELV A NÉPEK BARÁTSÁGÁT / ÉS A VILÁGBÉKÉT SZOLGÁLJA](#). [L. LAJOS ZAMENHOF POLA OKULKURACISTO / KREINTO DE LA LINGVO ESPERANTO / TIU INTERNACIA LINGVO LA AMIKECON DE LA POPOLOJ / KAJ LA MONDPACON SERVAS] – Foto pri la inaŭguro: Heroldo de Esperanto. Nr.1309. 1960-09-16. p. 1. – Adolf Holzhaus: Granda Galerio Zamenhofa. 2. Fondumo Esperanto, 1978. p.57., foto (preinta el HdE) pri la inaŭguro: p.363. – 1987: alia, ruĝmarmora memortabulo kun oraj literoj: [AZ ESZPERANTÓ NYELV / MEGALKOTÁSÁNAK / 100 ÉVES / ÉVFORDULÓJA TISZTELETÉRE / 1887-1987 / A BORSODI ESZPERANTISTÁK \[DE LA LINGVO ESPERANTO / KREO 100 JARA / DATREVENO ESTIME / 1887-1987 / LA ESPERANTISTOJ DE BORSOD\]](#) – Ĉe la komenco de la strato, sur la muro de la hejto-centro estas la tria, metala memortabulo en malbona stato: [Dr. ZAMENHOF L. LAJOS / 1859-1917 / varsói szemorvos / az / ESZPERANTÓ / nemzetközi nyelv megalkotója / 1887 \[D-RO L. LAJOS ZAMENHOF / 1859-1917 / varsovia okulkuracisto / la / ESPERANTO / internacia lingvo kreinto / 1887\]](#)

5. [Mezőberény. Zamenhof utca. 1989.](#)
6. [Nagyamaros. Zamenhof-kilátó](#) ĉ. 450 metrojn for de Esperanto-monto, sur orienta plilongaĵo de la monto, sur malgranda dekliv-konuso, proksime al Király-kút (Király-puto). Alto 235,5 m. **1973-05-13**, dimanĉe okazis la inaŭguro de tiu elrigardejo, kiun laŭ la iniciato kaj direktado de la esperantista arbaristo József Varga volontule konstruis la membroj de Esperanto-grupo de Kultúra Centro Madách Imre en Vác. En la nomo de tiu grupo Gyula Bénik salutis la ĉeestantojn, poste la esperantista Endre Baráth, unua sekretario de la Vác-distrikta parti-komitato en la Internacia Lingvo inaŭguris la elrigardejon. Li proponis, ke la esperantistoj kaj la naturamikoj en ĉiun duan dimanĉon de majo organizu Zamenhof-Pacmarŝon al tiu elrigardejo. La proponon apogis Margit Evva en la nomo de la Teritoria Esperanto-Komitato nr. 1. (t. e. la Budapeŝt-ĉirkaŭaĵa) En la 70-aj, 80-aj kaj 90-aj jaroj ĝi estis stacio de la tritagaj Zamenhofaj Internaciaj Pacmarŝoj. Ekde 2003 Kultúra Esperanto-Asocio denove organizas ekskursojn tien kaj al la proksima Esperanto-monto. La ĉirkaŭantaj arboj jam superkreskis la elrigardejon, kiu nun estas en malbona stato. – Fontoj: Váci Napló 1973-05-17. = Hungara Esperantisto. 1973. júl. p.16., Budapeŝta Informilo. 1973. jun. p.5. – <http://www.eszperanto.hu/index1.htm>
7. [Tótkomlós. Zamenhof utca. 1945.](#) Pli frue: Állomás utca.

**Estinta Zamenhof-toponimo: Nyíregyháza. (Dr. Zamenhof utca. 1959-1961).** Esperantistoj senpripense iniciatis ŝanĝi la nomon de la strato *Körte* (signifo en Esperanto: *piro*), kiu ekzistis ekde 1889-1959 (kaj ekzistas denove ekde 1961). Ili eraris ankaŭ je la surtabuligo de doktora titolo, malofte eraro de stratnom-donado en Hungario. Same eraris la urba asembleo akceptanta tiujn stultajn proponojn de esperantistoj. La loĝantoj de la urbo prave indigniĝis kaj atingis la renomigon en la jaro 1961.

#### **Plurloke menciitaj falsaj informoj pri neniam ekzistantaj Zamenhof-toponimoj:**

Szeged. Zamenhof utca. 1960. – Fonto: Hugo Röllinger: Monumente pri Esperanto. UEA, 1997. p. 37. – Eble temas pri la ne realiĝinta ideo de Ernő Farkas, kiu en 1957 iniciatis nomumon de Esperanto-strato en la sama urbo.

Tatabánya. Zamenhof utca. 1959. – Fonto: Hugo Röllinger: Monumente pri Esperanto. UEA, 1997. p. 38. – Verŝajne temas pri la strato Eszperantó inaŭgurita en la samaj urbo kaj jaro.

---

## Historio de toponimio Esperanta en Hungario

La unua internacia kongreso de la adeptoj de Internacia Lingvo Esperanto okazis en 1905. Ekde tiam Esperanto ricevis vastan lokon en la gazetaro, iĝis vaste konata, iel moda afero. Kelkajn jarojn poste esperantistoj sukcese iniciatis nomi stratojn je Zamenhof kaj Esperanto. Jardekojn poste oni komencis nomi stratojn ankaŭ pri aliaj esperantistoj, kaj krom stratnomoj aperis ankaŭ Esperanto-rilataj geografiaj nomoj aliaj (monto, fonto, ktp.)

Unue en 1912 en Hispanio nomis geografiajn objektojn je Zamenhof: placo Zamenhof en Terrassa kaj rondirejo Dr. Zamenhof en Sabadell. Unue en la brazila Realengo inaŭguris straton Esperanto la 5-an de oktobro 1913. E. Wiesenfeld en 1933 raportis pri 6 Esperanto- kaj 35 Zamenhof-stratoj<sup>1</sup>. Laŭ A. Holzhaus en 1969 238 Esperanto- kaj 114 Zamenhof-stratoj estis en la mondo, en 329 urboj de 26 landoj.

Hungario nur post la mondmilito aperis en tiuj listoj. Adolf Holzhaus en 1969 raportis pri 10 Esperanto- kaj 6 Zamenhof-stratoj en Hungario<sup>2</sup>. Hugo Röllinger en 1997 notis 34 geografiajn objektojn nomitajn je Esperanto kaj 7 je Zamenhof – sed iliaj pluraj informoj estis eraraj, kaj kelkaj menciitaj de li stratoj neniam ekzistantaj<sup>3</sup>. Kontrolinte tiujn datumojn ni trovis la situacion pezantitan supre. La historion de tiu toponimio mi resumos sube kaj poste mi prezentos la problemojn koncerne de tiu toponimio.

En Hungario la 12-an de aŭgusto 1928 inaŭguris Esperanto-fonton en la pitoreska Basina-valo de la vilaĝo Piliscsév. Plejparte esperantistaj naturamikoj de Hungaria Esperantista Societo Laborista konstruis la ĉirkaŭmasonaĵon de la fonto. La inaŭguron de Esperanto-fonto partoprenis 300 naturamikoj de la urbo Újpest kaj 200 loĝantoj de la vilaĝo Piliscsév, inter ili la lastaj la notario mem, kiu permesis realigi la planon. Post du semajnoj la notario tamen perletere malpermesis la „malpatriotan” kaj „kontraŭnacion” nomon, ĉar „ĝi vekis malsimpation de la patriotsenta loĝantaro de la vilaĝo”. Do, en Hungario la unua iniciato ne ĝisvivis sian surmapigon. Esperanto-fonto nur en la 1960-aj jaroj ricevis sian nomon.<sup>4</sup>

En la 1930-jaroj eĉ en la spaco aperis la unuaj Esperanto-rilataj astronomiaj nomoj. La asteroidoj Esperanto (1936) ĉirkaŭ la Marso, Zamenhof (1938) ĉirkaŭ a Jupitero cirkulis, sed en Hungario ankoraŭ neniu loko havis la rajton je tiaj „senpatriotaj” nomoj.

Hungariaj esperantistoj nur post la dua mondmilito havis la okazon je novaj iniciatoj. La unuan Zamenhof-straton oni inaŭguris en la jaro 1945 en la vilaĝo **Tótkomlós** (urbo ekde 1993). En la departementa arkivo mankas la dokumentoj pri la nomdono, sed konjekteble estis iu el tiuj „János TÓTH kaj liaj kunuloj” kiuj en la jaro 1927 iniciatis fondon de Esperanto-grupo en la vilaĝo, sed la distrikt-estro ne permesis tion. Post la liberiĝo iu tuj iniciatis, ke la straton Állomás (stacidomo) oni nomu pri Zamenhof. En Hungario tiu estis la unua Zamenhof-strato. En 1946 HES kaj HESL kune proponis al la ĉefurbo nomi straton pri Zamenhof, sed ili malsukcesis.<sup>5</sup>

---

<sup>1</sup> Wiesenfeld E.: Stratoj kaj monumentoj. = Enciklopedio de Esperanto. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1933. p. 512-518.

<sup>2</sup> Holzhaus, Adolf: Doktoro kaj lingvo Esperanto. Helsinki, 1969. p. 405-411. Zamenhof aŭ Esperanto-stratoj. – Holzhaus, Adolf: Granda galerio Zamenhofa. 2. Helsinki, 1978. p. 365-388. Stratabuloj.

<sup>3</sup> Röllinger, Hugo: Monumeto pri Esperanto. Rotterdam, 1997.

<sup>4</sup> B.V.: Forrásavatás. = *Népszava*. 1928-08-14. p. 13. – Fonto de Esperanto en la montpejzaĝo de Budapeŝto. = *Hungara Heroldo*. 1928-07-10. p. 95. – Lebonjták az Eszperantó-forrást? = *Pesti Napló*. 1928-09-21. p. 19. – Az eszperantó és a magyar közigazgatás. = *Népszava*. 1928-10-24. p. 10. – Zoltán Barna: La laborista Esperanto-movado en Hungario. 1913-1934. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. p. 84-85.

<sup>5</sup> *Sudhungarlanda Stelo*. 1946. maj. p. 2.

Poste oni nomis la unuajn Esperanto-stratojn: en 1945 en la kvartalo Gubacsi-hídfő de la urbo Pesterzsébet (ekde 1950 la XX-a distrikto de Budapeŝto), en 1946 en la VIII-a distrikto de Budapeŝto (Józsefváros) kaj en 1947 en la urbo Pestszentlőrinc (kvartalo Lónyaitelep). Tiuj tri Esperanto-stratoj hodiaŭ jam ne ekzistas.

Antaŭ la 100-a datreveno de la hungara liberc-batalo la 15-an de marto 1948 la ministro pri internaj aferoj lanĉis kampanjon por „ŝanĝi la stratnomojn elmodiĝintajn, nekonformigeblejn kun la demokrata etoso de la lando, kun la grandaj liberec-ideoj.”<sup>6</sup> Je la alvoko de tiuj nomŝanĝoj Ferenc Vasady-Kovács kaj Lajos Kőkény, la prezidanto kaj la kunprezidanto de la jam unueca landa E-organizaĵo Hungarlanda Esperanto-Societo kaptis la okazon por utiligi la situacion en intereso de Esperanto. Ili perletere memorigis la urbestrojn pri tio, ke la faŝismo, la malamikoj de la demokratio persekutis ankaŭ Esperanton. Post tiuj aludoj ili rekomendis nomi stratojn pri Esperanto kaj Zamenhof.<sup>7</sup>

Sekve de tiu iniciato en 1948 oni nomis la ĝis nun ekzistantajn Zamenhof-straton en **Rákoscsaba** (nun la XVI-a distrikto de Budapeŝto), Esperanto-stratojn en **Esztergom, Érd, Gyöngyös, Győr, Komárom, Nagykőrös, Pécs** kaj **Rákoscsaba**, krome la nun jam ne ekzistantajn Esperanto-stratojn en Soroksár (nun la XXIII-a distrikto de Budapeŝto), Sátoraljaújhely, Vác kaj Zalaegerszeg. En neniuj lando de la mondo ricevis la nomon Esperanto tiom da stratoj en la sama jaro. Krom la menciita letero la centro mobilizis ankaŭ la lokajn esperantistojn. Fervore laboris precipe Imre Lászlófi (Sátoraljaújhely), János Szabó (Rákoscsaba) Károly Krigler (Soroksár) kaj Németh Pál (Esztergom)<sup>8</sup>.

Tiu sukcesa kampanjo eĉ estus daŭrigita, se ne estus superreginta la stalinisma politiko en Hungario. Post la granda kresko en 1948 la nombro de Esperanto-stratoj malpliigis. En la jaro 1954 ricevis alian nomon Esperanto-stratoj en la distriktoj VIII-a, XIII-a kaj XXIII-a de Budapeŝto. La kaŭzo ŝajnis esti tute racia: en la estiĝinta granda Budapeŝto ne estu samnomaj stratoj!

Tiu raciigo de la stratnomoj tamen okazis tre strange. Esperanto-stratoj ricevis alian nomon, sed multaj aliaj samnomaj stratoj restis senŝanĝe en la diversaj distriktoj de Budapeŝto ĝis hodiaŭ. Tion verŝajne oni ne povintus fari sen la likvido de la landa Esperanto-societo. Esperantistojn oni silentigis per likvido de la societo, pluraj altaj protektantoj de la societo perdis sian influon kaj aliaj eĉ en prizono estis kiel „malamikoj de la popolo”. Mirakle, tamen restis po unu Esperanto- kaj Zamenhof-stratoj en la urbejo, kvankam malgrandaj kaj en la periferia kvartalo Rákoscsaba (distrikto XVII.)

Ekde la jaro 1957 Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro (1955-1960) denove povis libere organizi siajn lokajn grupojn kaj emisii „membroletojn”. Silente rekonstruiĝis la landa asocio. En la lokaj grupoj plurloke agadis iamaj laboristaj esperantistoj, kiuj same kiel ĝis 1948, kun granda elano laboris por Esperanto. Multaj el ili estis malnovaj sindikatanaj socialdemokratiaj aŭ komunistaj sindikatanaj, kiuj trovis siajn iamajn sampartianojn en la urbaj estraroj, aŭ ili mem estis en tiuj.

Nun estas 36 geografiaj objektoj kun la nomo Esperanto, el kiuj 31 estas enurbaj kaj 5 eksterurbaj. La enurbaj estas: 23 stratoj, 5 placoj kaj po 1 vojo, promenejo, pasejo kaj ponto. La eksterurbaj estas: 4 fontoj kaj 1 monto.

---

<sup>6</sup> Komárom-Esztergom Megyei Önkormányzat Levéltára Komáromi Fióklevéltára, Komárom Város Polgármester iratai 1114/1948 szám. Belügyminiszter. 201.070/1948. III/3. Rajk belügyminiszter levele a székesfőváros, a törvényhatósági jogú és a megyei városok polgármestereihez. 1948. január 28.

<sup>7</sup> Komárom-Esztergom Megyei Önkormányzat Levéltára Komáromi Fióklevéltára, Komárom Város Polgármester iratai 1114/1948 szám. Magyar Országos Eszperantó Egyesület. 164/1948. Vasady-Kovács Ferenc elnök és Kőkény Lajos társelnök levele polgármesterekhez. 1948. febr. 20.

<sup>8</sup> Dektri Esperanto-stratoj en Hungarlando. = *Hungara esperantisto*. 3(1948):4(jul-okt). p. 7.

## Problemoj de toponimio Esperanta en Hungario

Geografiaj nomoj ekzistas por identigo de geografiaj lokoj. Bona nomo de la ajna loko devas esti konstanta, bone memorigebla, bone distingebla de aliaj nomoj, kaj en feliĉa kazo iel memoriganta al la objekto. Krom tiu fundamenta rolo de la nomoj kaj ĉiuj aliaj faktoroj estas preskaŭ indiferentaj. Tamen ekde la 19a jarcento amase oni donis nomojn al geografiaj lokoj ne por memorigi la lokon, sed inverse, por ke la loko memorigu onin al persono, evento, ideo, ktp. Ofte oni tro-taksis tiun akcesoran funkcion de geografiaj nomoj, kaj tio ofte kaŭzas problemojn, aparte kiam tradician, bone funkiantan, belan nomojn oni ŝanĝas. Fundamenta funkcio de geografiaj nomoj ofte difektiĝas pro politikaj kaŭzoj.

Ankaŭ esperantistoj ofte forgesas, ke la nomoj estas por la geografiaj objektoj kaj ne inverse. Ekzemple en la urbo Nyíregyháza en la jaro 1959 esperantistoj sukcese iniciatis doni la nomon Zamenhof al la strato Körte (t.e. piro). La loĝantoj de la urbo prave indigniĝis kaj atingis la renomigon en la jaro 1961.

Por nomdono pleje taŭgas novaj stratoj. Malpli, sed akceptepteble estas elekti straton kun nomo griza, sensignifa, kie ankaŭ la loĝantoj trovas la novan nomon plaĉa. Oni ne rajtas ŝanĝi nomon nur pro tio, ke iu elpensis pli bonan, pli belan, ja tiukaze oni ricevus konstante ŝanĝiĝantajn nomojn. Identigo kaj estimo de tradicioj efikas samdirekte, al la konstanteco.

Alia eraro estas doni nomon kun antaŭnomo aŭ kun titolo (ekz. *dr. Zamenhof*), ĉar tio konfuzas praktikan uzon, ekz. en aŭtomata registro ĝi estos sub D anstataŭ sub Z, kie la Z-nomoj estas. Erare oni volis doni la nomon *Esperanto*, ja laŭ la hungara ortografio ĝi devas esti *Eszperantó*.

Tiuj, kiuj intencas ĉu studi toponimion, ĉu kontribui al nova nomdono, devas do koni la lingvojn hungaran kaj Esperantan, aparte scii ĉion necesan pri la propraj nomoj, koni la regulojn de ortografio kaj koni historion de Esperanto-movado. Plej saĝe estas ĉion zorge prepari kun lingvistoj, kun historiistoj kaj kun la esperantistaro. La problemoj pleje fontas el tio, ke oni haste kaj kun troa memfido provas realigi ideojn.

Sed eĉ tio ne sufiĉas. Oni devas koni ankaŭ la validajn jurnormojn, kaj la landajn kaj la lokajn, komunumajn. Krome tio bezonas politikan erudicion. Oni devas koni la konsiston de la asembleo de la loka aŭtonomio, kiu decidos pri la nomoj. Kaj ne nur koni, sed ankaŭ scii influi ĝin. Oni devas koni kaj influi ankaŭ tiujn komitatojn, komisionojn kaj ekspertizojn, kiuj prilaboros, prezentos kaj opinios la proponojn tiurilatajn. Oni devas koni kaj influi la lokan gazetaron tradician kaj elektronikan por atingi la necesan apogon, kaj poste ekspluati la eventon.

\* \* \*

### Pri similaj temoj vidu:

Rátkai Árpád: *Eszperantáliák Magyarországon*.

<http://www.eszperanto.hu/> aŭ <http://w3.hdsnet.hu/eszperanto/zeo-hu/>

**Esperantologio: belartaj aŭ metiartaj kreitaĵoj por la memoro de esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj, -eventoj, -verkoj, k.s.**

Pli detale: esperantologio estas statuoj, monumentoj, reliefoj, memortabuloj, memorŝtonoj, domornam-elementoj, tombmonumentoj, tombŝtonoj, ornampavimaj, informtabluloj el longe ekzistanta materialo, k. s. laŭdestine nmoveblaj memoraĵoj, belartaj aŭ metiartaj kreitaĵoj lokitaj

sur publika areo, aŭ en publikaj institucioj (bibliotekoj, temploj, tombejoj, ktp.) starigitaj por la memoro de esperantistoj, Esperanto-organizaĵoj, -eventoj, -verkoj, k.s..

Robert Kaminski: Zamenhof/Esperanto-Objektoj (ZEO). Pola listo. Łódź, 2006. 26 p.

Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Kroatio. - [http://jagor.srce.hr/esperanto-kel/bildoj\\_zeo.htm](http://jagor.srce.hr/esperanto-kel/bildoj_zeo.htm)

Listo de Zamenhof/Esperanto-Objektoj - [http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo\\_de\\_ZEO-j](http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_ZEO-j)

---

## Dankoj

Ankaŭ ĉi loke mi esprimas mian dankon al tiuj, kiuj per informoj, rimarkoj aŭ alimaniere helpis mian laboron: dr. József DOBOS (Sopron, Polgármesteri Hivatal), Katalin FARAGÓ (Hódmezővásárhely), György FLENDER (Békéscsaba), János KOVÁCS (Komló), Anna KÜRTI (Komárom, Levéltár), József LENCSÉS (Miskolc, Polgármesteri Hivatal), István MÉSZÁROS (Budapest), Boriša Milićević (Novi Sad), Rita PAPPNÉ ZÁNTHO (Szeged, Polgármesteri Hivatal), Attila SALGA (Debrecen), Zoltán SÜMEGHY (Szeged), Zoltán SZABADOS (Tótkomlós, Polgármesteri Hivatal), Imre SZABÓ (Budapest), Mihály SZEKERES (Makó), László SZILVÁSI (Budapest, [esperanto.hu](http://esperanto.hu)) Ildikó VUNÉ KIRÁLY (Szeged), Péter TIHANYI (Tatabánya), Balázs WACHA (Budapest).

© Árpád RÁTKAI, 2007-2010

[ratkai12@t-online.hu](mailto:ratkai12@t-online.hu)

### Originala teksto: 2007-01-19. Modifoj kaj kompletigoj:

**2007-01-28** Bálint Gábor (anstaŭa *Kehidakustány: Söjtör*), Esperanto (30. *Piliscsév*), Estintaj E-toponimoj (nova parto!), Pri similaj temoj (nova parto!), Dankoj.

**2007-01-29** Esperanto (*Sopron*), Dankoj.

**2007-03-01** Esperanto (Komló), Lazar Markovič Zamenhof, Dankoj.

**2007-04-28** Esperanto (Kecskemét) Giesswein (Győr)

**2007-06-01** Esperanto (Nagymaros)

**2007-09-16** Esperanto (Győr) traduko

**2008.05-18** Kosztolányi

**2008-07-09** Vikár (Dunavecse), Enkonduko (Pri kiuj...), Szentes: Esperanto-ponto (kompletigo)

**2009-02-27** Szemők

**2009-08-15** Veigelsberg – Ignotus (Bp XII)

**2009-09-13** Ĉirpanov

**2009-10-13** Baghy Levelek

**2010-02-13** Szentes: Esperanto-ponto (kompletigo)